LA BAPTO DE JESUO – 10a de januaro 2010

JESUO ANKAŬ ESTIS BAPTITA, KAJ DUM LI PREĞIS LA ĈIELO MALFERMIĞIS – Komentario al la Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

Lk. 3, 15-16, 21-22

En tiu tempo, kiam la popolo atendis, kaj ĉiuj diskutis en siaj koroj pri Johano, ĉu eble li estas la Kristo, Johano respondis al ĉiuj, dirante: Mi ja vin baptas per akvo, sed venas tiu, kiu estas pli potenca ol mi; la rimenon de liaj ŝuoj mi ne estas inda malligi; li vin baptos per la Sankta Spirito kaj per fajro".

Kaj kiam la tuta popolo estis baptata, Jesuo ankaŭ estis baptita, kaj dum li preĝis, la ĉielo malfermiĝis, kaj la Sankta Spirito malsupreniris sur lin en korpa aspekto kiel kolombo; kaj venis voĉo el la ĉielo: Vi estas Mia Filo, la amata; en vi Mi havas plezuron.

La unua parto de la Evangelio kiun la liturgio proponas al ni okaze de la solenaĵo de la Bapto de Jesuo oni jam prezentis en la tria dimanĉo de Advento, do ni jam havas la komentarion pri ĝi.

Ni limiĝas substreki la indikon kiun donas Sankta Johano la Baptisto pri Jesuo, "Li vin baptos per la Sankta Spirito kaj per fajro", tion poste Jesuo mem dementos. Jes ja Jesuo baptos per la Sankta Spirito – nome Li mergos la homojn en la amon de Dio – sed ne en la purigantan fajron aŭ en tiun de la puno.

Kiam Jesuo, en la libro de La Agoj de la Apostoloj, ĉe la versego 5a de la 1a ĉapitro, rediras la vortojn de Sankta Johano, Li tranĉas tiun pri la fajro, Li venis por porti vivon ne por ion detrui. Tio kio nin surprizas en tiu mistera speco de tranĉu kaj algluu kiun la liturgiistoj faras en la Evangelio estas ke en ĝi mankas la centra parto, kiu gravas por kompreni poste la ceteron. En la centra parto oni legas ke Johano evangeliis al la popolo, kaj kiu estas la respondo de la povo al la invito je konvertiĝo?

La respondo de la povo estas la subpremado. Kaj, fakte, la evangeliisto skribas ke "Herodo enŝlosis Johanon en malliberejo". Do, Johano tiu kiu esprimis la voĉon de Dio, kiu invitis al konvertiĝo kaj anoncis la bonan novaĵon, kiun Jesuo poste venos proklami, nu, tiu ĉi Johano estas silentigita. Tiu estas la stulteco de la povo. La povo opinias silentigi voĉon, ĝi ne scias ke ĉiufoje kiam ĝi tion faras, Dio starigas voĉon eĉ pli potencan ol la antaŭa.

Fakte, post la malliberigo de Johano, post kiam oni malhelpis Johanon anonci la bonan novaĵon kaj evangelii al la popolo. Jen Dio kiu naskas Jesuon, do, jen la stulteco de la povo,

La persekutado florigas la vivon, ne ĝin estingigas, sed tion la potenculoj neniam komprenas. Ĉiufoje kiam estingiĝas voĉo, Dio starigas alian pli potencan ol ĝi estis. Kaj ni venu al la fina parto de tiu Evangelipeco, ĉe la 21a versego.

"Kaj kiam la tuta popolo estis baptata, Jesuo ankaŭ estis baptita". La bapto estis simbolo de morto. Por la popolamaso ĝi simbolis la morton al ties pasinteco, maljusta pasinteco kaj la bapto devis

indiki ke estiĝis vivoŝanĝo konvertiĝo, malsama orientiĝo de la vivo mem, kaj tiu maljusta pasinteco poste estis tute forviŝita.

Ankaŭ por Jesuo la bapto estos simbolo je morto, sed ne je morto al peka aŭ maljusta pasinteco pri kiu li devas liberiĝi, ĉar li tion ne havas, sed la bapto por li simbolas la akcepton de la estonta mortigo. Tiom veras ke Jesuo, ĉiam en tiu ĉi Evangelio, kiam li priparolos la morton li ĝuste priparolos ĝin kiel bapton.

Ĉe la ĉapitro 12, en la versego 50a li diras, "Mi havas bapton, per kiu esti baptita". Do, Jesuo iras por esti baptita kiel la popolo, sed por la popolo la bapto simbolas la morton je la propra pasinteco, por Jesuo ĝi estas la fideleco al la Patro ĝis la akcepto de la mortigo en la estonteco.

"Dum li preĝis, la ĉielo malfermiĝis". La ĉielo estas la loĝloko de Dio; tiuepoke oni opiniis ke la ĉielo estis fermita, sigelita, tiom estis estintaj la pekoj kaj la kulpoj de Izraelo, ke la rilato inter Dio kaj Izraelo ne plu ekzistis. Nu per Jesuo, ekde kiam estas tiu homo kiu estas Dio kaj kiu, pro fideleco, pro amo, volas antaŭenirigi la planon de la volo de Dio, la ĉielo malfermiĝas kaj neniam plu ĝi fermiĝos.

Kaj la evangeliisto volas indiki ke ekzistas la reala kaj konstanta komunikado de la homo kun Dio. Do, pere de Jesuo ekzistas definitiva kaj konstanta komunikado de Dio kun la homaro. Nu, "la ĉielo malfermiĝis", do temas pri dia komunikado, "kaj la Sankta Spirito malsupreniris sur lin". La difina artikolo indikas la tutecon, la plenon, la kompletecon de la Sankta Spirito, nome la forton, la energion, la aktivecon mem de Dio kiu supreniras tute sur Jesuon.

La evangeliisto skribas ke tiu Sankta Spirito malsupreniras "en korpa aspekto", do, por indiki reale, vere la tuta Spirito malsupreniris sur Jesuon en reala, tuŝebla formo. "Kiel kolombo". Kial la bildo de la kolombo? La bildo de la kolombo revokas kaj la paroladon de Genezo, la kreon kie oni legas ke la Spirito de Dio ŝvebis super la akvo, kaj la tuta hebrea tradicio vidis tiun Spiriton ŝvebanta en formo de kolombo.

Sed ankaŭ ĉar oni konas la ŝaton al sia nesto de la kolombo. Kiam oni konstruas novan neston por la kolombo, ĝi ne tien eniras, ĝi restas fidele ligita al sia nesto. Tiam la evangeliisto intencas indiki ke Jesuo estas la loĝejo de la Spirito de la Patro, Jesuo estas la nesto, Jesuo estas la nesto de la Spirito.

"Kaj venis voĉo el la ĉielo", tio estas el Dio, "Vi estas Mia Filo", tiu estas citaĵo el la 2a Psalmo, kiu estis la stariĝo de la reĝo Mesio, sed antaŭ ĉio "Filo", en la hebrea kulturo signifas "tiu kiu similas la patron". Jesuo ne estas malsimila al la Patro, Jesuo estas kiel la Patro, do, oni ne povas apartigi Jesuon disde Dio, ĉar tio kion Jesuo faras estas tio kion Dio faras.

Kaj poste jen la esprimo "la amata". Tiu ĉi termino indikis la filon kiu heredis ĉion, la unuenaskitan filon. Kial Jesuo estas la amata? Ĉar li estas la heredanto, ĉion kion havas la Patro, tion havas ankaŭ Li.

"En vi Mi havas plezuron", do, tiu ĉi evangelipeco komencigas la aktivecon de Jesuo por komuniki tiun Sanktan Spiriton al kiuj Li renkontos.

.